

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, L. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 13

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

FEBRUARO 1933

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio:

Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof

(Fino.)

laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle.

(La suban paroladon ni ellasis el nia artikolo en „Lingva Kritiko“ n-ro 11 pro tio, ke ni volis doni plenan tekston por komparo.)

Paĝo 400.

Ferma Parolado en Washington 1910.

Referenco donita en O. Verk.: British Esperantist.

Nia referenco: Lingvo Internacia, XV, 1910, p. 428.

(La teksto el Lingvo Internacia estas donita inter » «. Grasaj literoj en () estas vortoj de la kritikantoj.)

Laŭ la tradicio de niaj ĝisnunaj Kongresoj, mi permesas al mi diri kelkajn vortojn de adiaŭa saluto.

»Laŭ la tradicio de niaj antaŭaj Kongresoj, permesu al mi, antaŭ ol ni disigos, diri al vi kelkajn vortojn de adiaŭaj salutoj.«

Mi volas diri kelkajn vortojn pri la semajno, kiun ni ĵus travivis.

(mankas)

Kiam mi decidis veni al Ameriko, mi konfesis, ke mi komencis mian vojaĝon kun iom da dubo. (Kiam li decidis veni . . . li jam komencis vojaĝon (?) Stranga logiko!)

»Kiam mi decidis vojaĝi al la Washingtona Kongreso, mi komencis mian pretigon — mi devas ĝin konfesi — kun iom aŭ eĉ kun sufiĉe da dubo.«

Sajnis al mi, ke Usono estas ankoraŭ tro juna en nia movado por fari Kongreson.

»Sajnis tiam al mi, ke Usono estas tro juna en nia movado, por ke ĝi povu prepari Kongreson.«

Oni devis tamen subteni niajn usonajn amikojn, kaj kiam mi venis, mi vidis kun ĝojo, ke miaj duboj estis vanaj.

(La unua subfrazo „Oni . . . amikojn“ kaj la resto ne estas tre lerte kunligitaj.)

»Tamen, mi diris al mi: ni devas nepre subteni la klopodojn de la Amerikanoj. Kiam mi alvenis ĉi tien, mi vidis, kun granda plezuro kaj ĝojo, ke miaj duboj estis vanaj.«

La Sesa estis sama kiel la aliaj Kongresoj, kaj restos en nia memoro same. („la aliaj Kongresoj“ ne estas tre klara, ĝi povas signifi „alilandajn“ aŭ „la kongresojn nun okazantajn aliloke“. La esprimo „restos en nia memoro same“ ŝajnas iom malforta.)

»La Kongreso estis, same kiel antaŭaj kongresoj, bona sukceso.«

Mi devas esprimi mian dankon al ĉiuj help-

intoj, speciale al gesinjoroj Reed — ĉion vi vidis, mi do ne ripetas — ankaŭ al ĉiuj, kiuj helpis. (La lasta subfrazo „ankaŭ al ĉiuj, kiuj helpis“ ŝajnas superflua post „ĉiuj helpintoj“.)

»Antaŭ ĉio, ni devas esprimi dankon al tiuj niaj amikoj, kiuj laboregis por tio, kaj precipe al niaj ĝeamikoj gesinjoroj Reed.«

Krom tio, ni ŝuldas dankon al la lando mem por la invito, kiun faris la Usona Registaro al aliaj landoj. Estas tre grava fakto, ke 13 Registaroj estis oficiale reprezentitaj. La lokaj aŭtoritatoj ankaŭ montris al ni grandan helpon, kaj en via nomo mi ilin ĉore dankas.

»Krom tio, ni ŝuldas dankon al la lando mem, al la registaro de la lando, kiun tiel afable kaj komplete faris servon al ni; kaj tre dankemaj ni estas al la registaro pro ĝia invito al reprezentantoj de aliaj landoj.«

(Rimarku, ke en la unua teksto „la invito al aliaj landoj“ ricevas pli grandan emfazon ol la „helpo“ al la kongresanoj, dum en la dua la ordo estas renversita, kaj emfazo kuŝas egalpeze sur la du partoj.)

Nun ni rigardu, ĉu la Kongreso donis iajn rezultatojn. Pri tio neniu dubas. La rezultatoj estos tre gravaj. (Rimarku la estontan formon de „estos“. Ŝajnas pli bona „estas“ en Lingvo Internacia.)

»Nun ni rigardu, ĉu la tuj finonta Kongreso donis ian rezultaton. Pri tio, neniu el ni povas dubi. La rezultato estas tre grava.«

Ĝi forte levos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo.

»Per ĝia kvazaŭ oficiala karaktero, ĝi antaŭenpuŝos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo, ĉio estas por ni tre grava.«

Kaj ankaŭ al multaj el niaj usonaj amikoj, kiuj ankoraŭ ne havis la okazon aŭskulti Esperanton parolatan de alilanduloj, la Kongreso sendube multe helpos pri la elparolado de nia lingvo. (Rimarku „helpOs“, kiu estas „helpis“ en la malsupra legado.)

»Ankaŭ al la Usonanoj mem la Kongreso faras profiton; ĉar nun, por la unua fojo, ili aŭskultis Esperanton parolatan de Eŭropanoj kaj sendube tio helpis al la ĝusta elparolado.«

Mi estas certa, ke kiam ni ilin revidos, ni ne plu rekonos ilin, sed demandoj pri ili, el kiu nacio ili venas? (Kial li estas tiel certa ke

„ni“ la kunvenintaj eŭropanoj aŭ gesinjoroj Zamenhof „ne plu“ rekonos ilin kiam ili revidos? Tuj post la parolo pri elparolado de Esperanto, oni povus supozi, kvankam tre neeble, ke li menciis, ke la Amerikanoj tuj spertigos en elparolado en tia grado, en kiu li jam ne povas distingi naciecon per elparolado, kaj demandos „el kiu nacio ili venas?“ — Iel ajn, tre malsprita rimarko!)

(mankas) (Rimarku, ke Lingvo Internacia ne havas ĉi tiun parton kun „ne plu“.) Kaj nun, ĉar ni devas disiri al niaj hejmoj, al ĉiu mi diras: Feliĉan vojon! Feliĉan vojaĝon! kaj esperas, ke mi vidos grandan parton el vi en Antverpeno.

»Nun, samideanoj, mi deziras por vi ĉiuj feliĉan vojaĝon al viaj hejmoj, kaj mi esperas, ke ni ĉiuj, aŭ almenaŭ granda parto de ni, revidos unu la alian en Antverpeno. Ĝis la revido en Antverpeno!«

La sesa Kongreso estas fermita. (mankas)

Ni havas nenian rimedon por certigi kiu el la supraj tekstoj estas la ĝusta. Tia dubinda teksto akre sentigas al ni la bezonon de pli detalaj kaj precizaj esploroj por pruvi la ĝustecon de la teksto.

400-34. ni ne plu rekonos ilin. Kiel ni jam menciis en nia rimarko 375-32/3, ni povas diri, ke „ne plu (verbo)“ ne estas Zamenhofa. Kvankam la mala formo troviĝas duloke en „Eliro“ de Hachette Biblio, ĉi tiu estas la sola escepto en la tuta Zamenhofaĵo, kaj „plu ne (verbo)“ estas absolute multenombra. La tri ekzemploj en Originala Verkaro ĉiam troviĝas en dubindaj tekstoj. Vidu ankaŭ nian rimarkon pri OV 412-18.

Postparolo. Ni alvokas al vi, eŭropanoj-samideanoj, ke vi helpu en serĉado kaj publikigado de aŭtentikaj dokumentoj rilatantaj al Zamenhof por la bono de la tuta studentaro de Esperanto. Vi estas en pli oportunaj lokoj ol ni por serĉi tiajn dokumentojn en bibliotekoj, malmovaĵistoj aŭ ĉe privataj personoj. Se la posedantoj de gravaj dokumentoj estas tute indiferentaj kaj lasas ilin kuŝi sub polvo, aŭ se la posedantoj konservas ilin nur kiel kuriozaĵon monalportontan kaj ili mem ne havas eĉ la plej malgrandan intencion por studi, tiam faru ĉion por ilin konvinki pri sia eraro, por ke ili publikigu ĝis nun kaŝitan materialon aŭ ke ili partoprenu en perfektigado de la jam aperintaj Zamenhofaĵoj kontrolante per la materialoj, kiujn ili posedas. Ĉar por el-labori en estonteco pli kompletan gramatikon aŭ vortaron de Esperanto, oni vole-ne-vole devas sin turni al Zamenhofaĵo — tia fundamenta laboro estis jam komencita de diversaj studentoj, ekz. Wüster, Dietterle k. a. Sed se ili ne havas solidan bazon de plej fidinda Zam-teksto, ilia laboro perdas multe de sia valoro. Kolosa laboro kiel

teksto-kritiko de ĉiuj Zamenhofajoj ne povas esti farata per laboro de unu sola persono. Tial ni plej forte alvokas al seriozaj legantoj de Heroldo, ke ili prenenu sian parton, publikigante novan materialon aŭ kritikon aŭ eĉ prunti al ni materialon, se ili ne

povas iakaŭze tion fari mem. La afero tre urĝas, ĉar necesaj dokumentoj rapide perdiĝas kun la tempo. Etendu viajn helpmanojn! Ju pli frue, des pli bone!

Kunlaborita de T. Sasaki, J. Iŭaŝita, N. Sugano, I. Kurijama.

Publika letero al s-ro Dratwer.

Estimata Sinjoro!

Kvankam vi ne nomas min rekte en via Publika Letero (Lingva Kritiko n-ro 12), evidente la tuta artikolo estas direktita kontraŭ mi. Akceptu do mian respondon.

Via letero estas skribita kun la senorienteco kutima en la samtemaj kaj samtendecaj artikoloj. Oni ofte vere ne scias, ĉu tiu senorienteco estas vera aŭ nur ŝajnigita por ekdiri sub ĝia ŝirmo pli vervajn verdiktojn.

Ekzemple vi parolas pri „Zamenhofa fundamenta Esperanto“ por kiu devas batali „la tuta konscia esperantistaro“. Sed kio estas tiu „Zamenhofa fundamenta Esperanto“? La fundamenta Esperanto kaj la Zamenhofa Esperanto ja tute ne estas identaj. La antaŭa estas vortmalriĉa lingveto, kaj en la tuta Esperanta literaturo apenaŭ ekzistas libro, kiu tenus sin al ĝia malgrasa vortmaterialo. Zamenhof ja klare deklaris:

„Mi decidis publikigi (en la Fundamento) vortareton nur tre malgrandan kaj nur plej necesan por la ordinara vivo, lasante ĉion alian al libera iom-post-ioma evoluo . . .“

„Se ja vorto nek estas sendube internacia, nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estus tute ne eble aŭ tro neoportuna aŭ teknike ne precize — tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bonrovo . . . Tiu ĉi permeso estas necesa, ĉar alie la lingvo estus tro rigida . . .“

Kaj vi, sinjoro, devus scii, ke Zamenhof estis ĝis nun la plej granda neologisto en Esperanto. Ne nur teorie li deklaris:

„Neologismoj nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por la lingvo nenian danĝeron . . .“

Sed ankaŭ praktike li ekuzis novajn vortojn amasege. Ekzistas pli ol tri mil Zamenhofaj neologismoj, kies granda parto ĝis nun ne estas oficiala, multajn el ili ne entenas eĉ la Plena Vortaro de SAT.

Kaj vi devus scii, ke en Sinjoro Tadeo, kies tradukcon inter aliaj vi menciis kiel „juvelon aperintan en la vera Zamenhofa Esperanto“, troviĝas pli ol 200 vortoj tute novaj, el kiuj 90% ĝis nun ne estas oficialigitaj.

Nun, ni rigardu pri la „Streĉita Kordo“ kaj „Eterna Bukedo“. En ili kune troviĝas 140 neoficialaj vortoj, sed el tiuj 40 estas Zamenhofaj, 37 estas registritaj en la Plena Vortaro; el la restintaj 65 la plejparto estis uzata de Grabovski aŭ de aliaj bonaj aŭtoroj kaj vortaristoj kaj estas sume nur 8 vortoj uzitaj unue de mi.

Inter tiaj cirkonstancoj do mi povas trankvile aserti, ke la lingvo de ĉi tiuj libroj estas Zamenhofa. Ĝi tenas sin al la Zamenhofa tradicio pri libera evoluo kaj al la Zamenhofa principo de iom-post-ioma progreso.

Krome ĉiu nova vorto uzita de mi estas pravigita per analogia Zamenhofa aŭ Grabovskia neologismo. Cu vi povas kondamni la vortojn dura kaj trista, ne kondamnante la Zamenhofajn kalva, strikta, stulta aŭ la

Grabovskiajn rara, humida, neglekti, noci, disipi? Cu stumbli (falpuŝiĝi) ne estas same necesa aŭ nenecesa kiel la Zamenhofa **tre**ti (piedpremi)? Cu ili ne estas analogaj anstataŭigoj de vortoj **neoportuna**j en poezio? Kaj ĉu vi ne kredas al mi, ke sole la du vortoj **trista** kaj **povra** ebligas formfidelan tradukcon de multaj poemoj, kiuj sen ili estus nekonkereblaj?

Rekonu do, ke via argumentado per la grandaj poemtraduktoj de nia literaturo estas tute falsa: ĝi baziĝas sur nekono de evidentaj faktoj.

Ankaŭ viaj ceteraj asertoj ne staras sur pli fortaj piedoj. Ekzemple, vi plendas, ke vi devas preni fremdlingvajn vortojn por kompreni miajn verkojn. Sed saĝe vi silentas pri tio, ke mi starigis la nepran postulon, ke ĉiu verkisto devas klarigi en sia libro ĉiujn poeziajn vortojn neoficialajn aŭ almenaŭ tiujn, kiuj ne troviĝas en la Plena Vortaro: ĉi tiu postulo estas plenumita ne nur en miaj propraj verkoj, sed en ĉiuj aperintaj sub mia kontrolo. Estas tute strange, ke vi tamen ŝvite esploris vortaregojn, anstataŭ simple foliumi ĝis la Listo de Neologismoj.

Poste vi diras, ke per tia „evoluo“ Esperanto „ĉesos esti lingvo facile elternebla de ĉiu.“ Nu, aŭdu, kion skribis Zamenhof al kapitano Capet (Orig. Verkaro pĝ. 429):

„Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacila. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn, kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunanajn principojn de la Esperanta vortfarado.“

Aŭ aŭdu ĉi tiun citaĵon:

„Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas . . . Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta ol la lingvo de infanoj kaj tamen la lingvo de ĝuste

parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko skribita antaŭ 25 jaroj ne estas tiel vorto-riĉa kiel verko skribita en la nuna tempo kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdiĝas absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo . . .“ (Parolado dum la Oka Kongreso).

Jen kiel Zamenhof respondas vian vervan ekkriion: „Esperanto devas esti senŝanĝa!“ Riĉiĝo ne estas ŝanĝo. Lingvon pliriĉigintan oni ne devas „relernadi“, sole jom kompletigi sian scion. Kaj por uzi la lingvon, oni ne devas fari eĉ tion, ĉu povas ja sin teni al la plej malvasta vortprovizo. (Vi parolas ja ankaŭ pri novaj gramatikaj reguloj, sed tiuj ekzistas nur en via fantazio.)

Kaj nun, pripensu, ke tiu pliriĉigo koncernas nur la literaturan, eĉ, plejparte, nur la poezian lingvon. Mi ja ĉiam emfaze plendis por la apartigo de la vulgara kaj poezia vortprovizoj, laŭ la ekzemplo de multaj naciaj lingvoj. Kaj kiel ajn oni batalu kontraŭ ĉi tiu principo, ĝi estas la sola rimedo por ĉesigi la eternan proceson inter poetoj kaj propagandistoj, ĉar ĝi ebligas tute liberan evoluon de la poezia lingvo kaj samtempe la plej konservativan simplecon de la lingvo vulgara (interparolo, korespondado, gazetartikoloj, amuzliteraturo).

Por la „modestaj uzantoj de la lingvo“ kaj por la „ĉiutagaj praktikuloj“ do la lingvo restas „senŝanĝa“. Sed se tia modesta uzanto volas legi ĉefverkojn, li iĝas **fiera pretendanto de artelezuro**, kaj li devas iom — nu, ne lerni, sole foliumadi al la Listo de Neologismoj. Do oni pretendas de li nenian specialan penon, sole la klarvidan formeton de la antipatio kontraŭ la Zamenhofprincipa pliriĉigo de la lingvo.

Vi diras, ke multaj forlasis Esperanton pro la novaj vortoj. Kara sinjoro, tio estas simple ridinda. Imagu, ke iu lernas la italan lingvon kaj bone uzas ĝin por multaj siaj bezonoj, sed subite li, kolere, tute ĉesas pri ĝi okupiĝi, ĉar — li ne komprenis sen komentario ĉiujn vortojn de Dante. Cu tia homo estas normala? Cu la evoluo de la Esperanta poezio dependu de similaj ne-normaluloj?

Multon mi devus ankoraŭ skribi, sed ĉi tiun ampleksan temon oni ne povas ekferpi en tia letero.

K. Kalocsay.

La formoj „ata“ kaj „ita“

en la Zamenhofa uzado.

Kun granda kaj aparta intereso mi legis la studojn de la klaraj samideanoj s-roj T. Jung kaj Prof. G. Waringhien pri la problemoj „ata—ita“; ambaŭ provis starigi sistemojn por la uzado de tiuj finaĵoj. Zamenhof, kreinte la helpan lingvon, donis al ni nenium gramatikon, sed nur 16 simplajn regulojn; kompense, li multe skribadis, ĉiam bazita sur la logikeco de la nova idiomo. Estas do tre kurioze konstati nian implikigon en tiu ĉapitro de nia gramatiko, tiel, ke ĝi nun aspektas kiel vera problemoj.

Konstatinte la sisteman forigon de la formoj „estas ita“ kaj „estis ita“ en la frazoj esprimantaj agon pasintan, preteritan, kaj ilian anstataŭigon per la formoj „estis ita“, mi de kelka tempo komencis relegi la klasikajn verkojn kaj kolekti ekzemplojn de Zamenhof kaj de s-ro K. Bein; kaj, ĉar jam nun okazas interesa diskutado, kiun volonte

akceptas „Lingva Kritiko“, tial mi rapidas diri ankaŭ kelkajn vortojn.

La finaĵo **ata** por la preterito, por esprimi agon izolatan kaj kompletan, ne trovas iel ajn pravigon. Ni prenenu, ekzemple, la „Originalan Verkaron“ de Zamenhof: tie ni ne trovas, se mi bone memoras, eĉ unu „estis ita“ por la preterito, t. e. en la okazoj, en kiuj oni uzus, en la aktiva voĉo, la formon **is**, por esprimi agon unumomentan, finitan, kompletan. Ni trovas tuj en la antaŭparolo de „Fundamenta Krestomatio“:

„ . . . ĉar multaj esperantaj libroj estas verkitaj de personoj . . .“

„Ĉiuj artikoloj en la Fundamenta Krestomatio estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ — se ili estas skribitaj de aliaj personoj — ili estas korektitaj de mi . . .“

Zamenhof ne diris: estis verkataj, estis skribataj, nek estis korektataj.

En „Marta“:

Pg. 84 — „... la vizaĝo de la juna patrino estas desegnita de vi kun videbla sentemeco ...“

Pg. 149 — „... la fino de la manuskripto, ĝiaj lastaj paĝoj, estas tradukitaj bonege ...“

En la antaŭparolo de „La Batalo de l' Vivo“ diras Zamenhof:

„Ĉar la verko ne sole ne estas tradukita el la originalo, sed mi eĉ ne komparis ĝin kun la originalo ...“

Estas kurioza tiu peco de la manuskripto, presita faksimile: tie ni vidas klare, ke la majstro skribis antaŭe „estis“ kaj ĝin poste korektis: „estas“.

Tre intence mi citis ekzemplojn, kiuj esprimas ĝustedire agon: ĉar la formo „estas ita“ respondas ankaŭ al stato; ekzemple, samideano s-ro Jung diras (L. K. n-ro 5): „La pordo estas fermita“, t. e. la pordo troviĝas fermita, sed poste li diras „La pordo estis malfermata“ por esprimi agon (agon kompletan, finitan: „oni malfermis la pordon“), kaj tamen li diras, ja prave, ke **ata** signifas **daŭron**. Pro la signifo mem de **ata** kaj **ita**, mi ne povas kompreni, kial oni diru: „S-ro A. estis elektata prezidanto“ (= oni elektis s-ro A. prezidanto), aŭ „Enirante en la arbaron, ni estis atakataj“. „Ata“, devenante de la estanta tempo (prezenco) as, esprimas agon nunan rilate al la tempo, en kiu ĝi okazas, agon ankoraŭ estantan, do nekompletan. „Ita“, devenante de is, preterito, signifas rezulton, agon kompletan, finitan.

„Estis ata“ do oni povas nur uzi en la jenaj okazoj:

a) Ago **samtempa** kun alia ago:

„... ĉi tie la infanoj ludadis ... dum en la sinagogo estis legata la semajna partaĵo.“ („Rabeno de Baharafi“, pg. 9).

Ludado kaj legado estas samtempaj.

b) Ago **longedaŭra**:

„... la solaj aŭdeblaj sonoj estis la aktra sonado de la grandegaj tondiloj, kiuj preskaŭ senĉese estis movataj de la spertaj manoj.“ („Marta“, pg. 126).

c) Ago **kutima**:

„La planoj estis farataj en unu sola loko ...“ (Kabe, „La Faraono“ Vol. I, pg. 99).

Krom tiuj okazoj facile klasigeblaj, ni trovas „estis ata“ ĉie, kie temas pri ago estanta en momento pasinta, sed **nekompleta**.

„Palacoj kaj vilaĝaj dometoj estis vidataj tra belegaj arbaroj ...“ (F. K. pg. 39).

T. e., ĉiu, kiu venus al tiu loko, povus vidi tion.

„Per sia naskiĝo, ... si estis rigardata kaj sin mem rigardis kiel virinon kleran.“ („Marta“, pg. 131.)

„Tie en unu bela mateno de aŭtuno estis aŭdata muziko kaj sincera ridado ...“ (B. de l' V., pg. 7).

Kaj tiel plu: mi povus prezenti multajn ekzemplojn; sed ĉiu el ili havas la saman karakteron.

*

Ni diras, ekzemple: „Mi ricevis mian diplomon“ (mi ankoraŭ vivas) kaj per la sama formo aktiva: „Zamenhof ricevis sian diplomon“ (li ne plu vivas). Sed: „Mi estas diplomita inĝeniero“ kaj „Zamenhof estis diplomita kuracisto“. Tiu ĉi lasta ekzemplo montras klare, ke la ĉeso de la stato

postulas la tempon „estis“. Kaj tial, diris Zamenhof:

„Estas tre grava fakto, ke 13 Registaroj estis oficiale reprezentitaj ...“ („Originala Verkaro“, pg. 400).

Tio estis lia Fenna Parolado en Washington, 1910.

„... tio ĉi estis akceptitaj jam multe da tre gravaj gastoj.“ (Samloke, pg. 381).

„Mia patrino komence estis tre afliktita ...“ („Marta“, pg. 113).

Aliaj konsideroj: Pri homoj mortintaj oni povas diri „estas“ nur en la frazo: „Li estas mortinta“, sed, ankoraŭ en tiu okazo, nur se ni esprimas staton, se ni rilatigas la sencen de la frazo al la nuna momento. Ekzemple, ni dirus: „Zamenhof estas mortinta jam de pli ol 15 jaroj“, ĉar ni volas paroli pri lia **nuna** stato kaj lia stato de mortinto daŭras: por ni, nun vivantaj, Zamenhof estas homo jam kaj por ĉiam mortinta. Pri lia naskiĝo, diplomado, k. c., ni povus diri nur „estis“, ekz.: „Zamenhof naskiĝis (= estis naskita) la 15an decembro 1859“. Komp. F. § 12. Nu, la naskiĝo de homo jam nun mortinta estas okazo pli ol **pasinta**, ĉar la ĝustedira perfekte, t. e. la okazo plej proksima al ni, estas lia morto, kiu ĝis nun daŭras. Lia kondiĉo de homo naskita, diplomita, k. c. ĉesis pro lia morto; kaj tamen, mi insistas, ni diras: „Zamenhof naskiĝis, diplomatiĝis“, ktp., uzante la preteriton is.

Tiuj ekzemploj esprimas ankaŭ **staton** **nedauran**, okazan **situation** post ago plene finita. Memkompreneble oni ne povus diri, ekzemple en la frazo de O. V. pg. 381, „estas akceptitaj“, ĉar la stato ĉesis, nek „estis akceptitaj“, ĉar temas pri ago finita: la elekto de „estis itaj“ estas do nediskutebla.

Precipe se oni fiksis iun momenton pasintan, se la frazo entenas „kiam“, „tiam“, ktp., oni povas klare kompreni, ke la formo de la helpverbo povas esti nur „estis“; kaj se la ago estas kompleta, ni devas uzi „ita“.

Ni trovas ĉe Zamenhof ankoraŭ „estis ita“ eĉ tiam, kiam la stato daŭras, ekzemple:

„Ili diras, ke la Lingva Komitato estas elektita „ne leĝe“! ...“

„Ĝi estis elektita en kongreso, en kiu ...“ (O. V. pg. 450).

Tiu L. K. ankoraŭ estis, daŭris; sed „estis elektita“, ĉar Zamenhof fiksis la okazon, kiam fariĝis la elekto.

Krom tiuj okazoj, en kiuj la verbo „esti“ signifas „troviĝi“, ni trovas aliajn, en kiuj ĝi havas la sencen de verbo unuiganta la predikaton al la subjekto, kiel: „Mi estas Esperantisto“.

„Tiu ĉi palaco estis konstruita el helflava brilanta speco de ŝtono ...“ (F. K., pg. 44).

„Snitchey kaj Craggs estis edzigitaj.“ (B. V., pg. 30).

T. e.: la palaco estis domo konstruita ... S, kaj C. estis homoj edzigitaj. Tiuj frazoj esprimas ankaŭ la pluskvamperfekton, sed la verbo „estis“ ne signifas „troviĝi“.

La uzon de la formo „estis ita“ por la preterito kelkaj samideanoj kontraŭdiras, ĉar ili trovas ĝin „nenatura“; sed, ni faru kelkajn konsiderojn. Kion signifas, ekzemple, „skribis“? Ni rigardu la agon jam plenumita, finita, plena. „Skribis“ (ago plena) signifas „igis skribita“; se mi skribis leteron, mi igis leteron skribita. En la pasiva voĉo ni diras, sekve: letero igis skribita. Se ni ekzamenos verbojn finant-

ajn je „igi“, ni trovos tion saman (mi parolas pri ago kompleta), ekzemple „detruigi“ = **igi** detruita = esti detruita. Tial ni diru: „En tiu batalo du aeroplanoj estis detruitaj = igis detruitaj = detruigis“, frazo respondanta al: „En tiu batalo oni detruis ... = oni igis ... detruitaj“. Ni vidu Zamenhof-on:

„... kiam la vespero fariĝis pli malluma, centoj da koloraj latenoj estis ekbruligitaj ...“ (F. K., pg. 41).

„Lia ideo estis unuvoĉe akceptita kaj tuj estis kunmetita telegramo ...“ (Samloke, pg. 85).

„Ĉi tiu demando estis farita per tono gentila ...“ (Marta, pg. 25).

„La kaŝejo estis antaŭ la pordo. La pakajo estis surmetita ...“ (B. V. pg. 28).

„Antaŭ kvin jaroj, ĉe la Bulonja kongreso, estis prezentita projekto ...“ (O. V., pg. 392).

„... mi prezentas al mi, kiel malagrable vi kredeble estis surprizita, kiam vi ... trovis tiun demandon!“ (Saml. pg. 322).

En tiuj kaj similaj frazoj, „esti“ egallas „igi“, ne „troviĝi“ jam antaŭe; aŭ, se oni volos, ĝi signifas „troviĝi de tiam“ aŭ „ektroviĝi“.

Ni vidas tiel la kuriozan gradigadon de sencoj de la helpverbo: por unuigi la predikaton al la subjekto, „troviĝi jam antaŭe“, „troviĝi nedaŭre“, „ektroviĝi“. Ĉu tiu plureco de sencoj esprimata per unu sola formo estas nekonvena? Tute ne, ĉar, unue, la vortoj valoras nur en la frazo, kaj la senco de la frazo montras sen dubo la penson de tiu, kiu ĝin skribis; due, pri la dubo, ĉu ne temas pri „troviĝi jam antaŭe“, laŭ la ordinara interpreto, kiam oni trovas „estis ita“, tio ne malhelpas, ĉar tiaj adverbiaj esprimoj, kiaj „jam antaŭe“, „ankoraŭ ne“ ktp. nepre aperas, implicite aŭ tutklare en tiuj okazoj.

Mi citis en la komenco formojn de preterito esprimatajn per „estas ita“; ankaŭ aliloke ni vidis tiun formon en aliaj frazoj. Ni povas nun paroli pli larĝe pri la diferenco inter „estas ita“ kaj „estis ita“.

Signifante „troviĝi“, la helpverbo „esti“ devas esti uzata por esprimi **staton**:

„... tiu kapo, kiu estas iom klinita antaŭen ...“ (Marta, pg. 85).

„Dagon ... estas ruinigita.“ (Kabe, op. cit., pg. 92).

Kun la senco de verbo unuiganta la predikaton al la subjekto, (kiel ni faris pri la formo „estis“), la uzado de „estas ita“ estas facile trovebla. La supran ekzemplon mem: „Dagon ... estas ruinigita“ oni povas interpreti: „Dagon estas nun homo ruinigita“.

Ĝis tiu ĉi punkto la „problemo“ estas facila; sed, kiam oni deziras esprimi ĝustedire **agon**, tiam ni trovas plej ofte „estis ata“. Tamen, se ni bone ekzamenos, ni vidos, ke en tiuj frazoj oni esprimas ankaŭ agon, sed agon, kies momento de plenumado ne interesas nin. Tial diras Fructier: „iam“, ne gravas „kiam“. Ni vidu ankoraŭ:

„Kio! la romano estas tiel facile forgesita!“ (B. V., pg. 42).

Se ne estus tiu „tiel facile“, ni povus diri: „La romano estas (= troviĝas) forgesita“, kaj neniu erarus kaj ne estus dubo. Ĉu tie Zamenhof povus diri: „La romano estis ... forgesita“? (La formo „estis ata“ estas ekster iu ajn konsidero.) Ne, ĉar an-

koraŭ tie oni deziras esence esprimi **staton nunan**, staton, kiu ankoraŭ daŭras, devenintan de ago pasinta. Tiu estus, ni povus diri, la preterito absoluta, same kiel ni diras: „Mi legis“: tiu pasinta ago, oni scias, rilatas al la nuna momento (nuna kun sia plej fariĝa senco), al la momento, en kiu oni diras tiun frazon.

Se oni fikskas daton (eĉ folkajn cirkonstancojn!), oni deziras atentigi speciale al la ago en la ĝusta momento de la fariĝo: do, „estis“; se oni ne difinas la momenton, oni esprimas preferencan staton, do „estas“. Ni vidas, per tiuj ĉi konsideroj, ke por tiuj agoj finitaj ni ne povas uzi „estis ata“, laŭ la moderna gusto.

Tiu ĉi estas nur supra studado, ĉar la problemoj estas iom pli delikataj, kaj ni ne povas ĝin plene disvolvi en gazeta artikolo. Tio, kion mi devas fari, estas legi atente la klasikajn fidindajn verkojn kaj konsideri aparte kaj tre zorge ĉiun formon uzitan. Ekster tiu konduto ni dezirus trovi solvon por problemoj jam solvitaj kaj do ĝin rekte eldetri.

Ankoraŭ unu superrigardo:

Se ni diras: „La pordo estis malfermata“ (= oni malfermis la pordon) (L.K. n-ro 5), aŭ: „Tiam la ŝarĝoj estis demetataj“ (n-ro 11), ni vidas implicite plenumadon de ago: ni nin transportas al tiu momento pasinta kaj vidas plenumadon, ne rezultaton. Ne tion ni deziras esprimi, kiam ni en la pasiva voĉo uzas la preteriton is.

Post la ekzemploj en „Lingva Kritiko“ n-ro 5 diras s-ro Jung: „El la supre cititaj frazoj . . .“ Nu, kial „civitaj“? Tiu particeps estas ligita al la helpverbo tie ne aperinta, t.e. la tuta frazo estus: „El la frazoj, kiuj estas supre cititaj“. Se li dirus la frazon tutan, konsente kun sia sistemo, li dirus: „El la frazoj, kiuj estis supre cititaj“ (= kiujn mi supre citis), t.e., li devus diri: „El la supre cititaj frazoj . . .“

Alia konsidero: laŭ la simetrio inter la aktiva kaj la pasiva voĉo, oni certe ne dirus en la aktiva: „Tiam la portistoj estis demetantaj la ŝarĝojn“. Ĉu oni ne vidas, ke en tiu frazo oni estis ĉeestanta la plenumadon de la laboro? Ĉu oni ne sentas, ke mankas iu kompletigo, iu alia okazintaĵo, al kiu ni rilatigu la agon de la malŝarĝado, ekz.: „Dum la karavanestro salutis (estis salutanta) sian amikon . . .“?

„Ata“ signifas ja „ion, kio okazas en la sama momento, pri kiu oni parolas“, sed, atentu bone: „okazas“; se ni transiros al tiu momento, ni vidas la okazantaĵon, sed ne la finitecon de la ago. Rakontante nun la okazintaĵon, ni ne ĉeestas ĝin, ni ĝin vidas jam finita. Se ni akceptas, ke ĉi signifas finitecon de la ago, mi opinias, ke neologika estas la uzado de „estis ata“ por la preterito (ago kompleta).

„Ita“ signifas antaŭtempecon; estus pli bone diri: antaŭtempecon oni esprimas per **ita**; t.e. tiu finaĵo estas uzbla ne nur por esprimi agojn finitajn, aŭ simplajn rezultatojn, kiel ankaŭ agojn, kies fariĝo okazis antaŭ la momento preparolata. Tiuj du okazoj ne estas egalaj.

Tial diris Zamenhof:

„ . . . mi estas tro maljuna por esti ankoraŭ konvertita . . .“ (B.V. pĝ. 20).

„Ĉu vi volas esti forpelita?“ (Saml. pĝ. 21).

„ . . . se vi estos venkita, oni diros . . .“ (F.K. pĝ. 25).

„Kial al li estus permesite ekspluati por si . . .“ (Marta, pĝ. 39.)

En tiuj frazoj ni vidas la **rezultaton**, la agon finitan. „Esti forpelita“, ekzemple, ne signifas tie „esti jam antaŭe forpelita“; Zamenhof ne povus diri „esti forpelata“, ĉar tiam li esprimus ĝustedire la plenumadon; li volis atentigi al la ago plena, al la stato post la ago, t.e. „Ĉu vi volas troviĝi (baldaŭ, ne jam antaŭe) forpelita, kiel homo forpelita, kiun oni forpelis?“

Saman rezonadon oni devas fari pri la formo „estis ita“ nuntempe apartigita por la pluskvamperfekto. Se la pluskvamperfekto oni diras per „estis ita“ (la sola formo uzbla), tio ne signifas, ke tiu formo estas ekskluziva je tiu tempo, same kiel la ceteraj formoj je **ita** ne signifas antaŭtempecon. Tial, multaj uzas la finaĵon „ata“; sed, ĉu en la aktiva voĉo ili dirus „anta“ (precipe „estis anta“)? Per tiu uzado oni ne povas distingi la imperfekton de la preterito. Oni diros: „Kiam mi alvenis, la kunsido estis malfermata“, t.e. la prezidanto estis malfermata ĝuste en tiu momento, vi ĉeestis la malfermon, vi aŭdis la parolon de la prezidanto; same kiel: „La kunsido estis malfermata je la oka horo“, t.e. la prezidanto malfermis ktp. Se oni do kondamnas la uzadon de la formo „estis ita“ por la preterito, ĉar ĝi apartenas ekskluzive al la pluskvamperfekto, oni logike ne povas akcepti la uzadon de „estis ata“ samtempe por la imperfekto kaj por la preterito. Se iu diras, ke „La pordo estis malfermata“ signifas „oni malfermis (tiam) la pordon“, iu alia samideano povus trovi, tre prave, kaj laŭ la logikeco de la simetrio, ke tiam oni estis malfermata la pordon, kaj do ĝi ne estis ankoraŭ tute malfermita. Dirante tamen „estis malfermita (tiam)“, oni eĉ povas vidi la plenumadon de la ago; sed tiun plenumadon ni ne deziras aŭdi, ĝi nin ne interesas; cetero ni ne havas alian agon, al kiu ni rilatigu tiun malfermon (por esprimi samtempecon de du agoj). Tiel dirante, ni deziras esprimi **rezultaton**: kaj tiun ĉi oni povas esprimi nur per **ita**. Tial uzadis Zamenhof la formon „estis ita“, kaj ni dirus: „La kunsido estis malfermita je la oka“. Per tiu ĉi frazo ni ne volas diri, ke oni malfermis la kunsidon **jam antaŭ** la oka; ni devas ĝin interpreti jene, ekzemple: „La kunsido estis (ĝi jam forpasis) kunveno, kiun oni malfermis (= malfermita) je la oka.“ „Kiun oni malfermis“ ni ne povas egaligi al „malfermata“, ĉar tiu ĉi formo respondas al „kiun oni malfermas“ (nun aŭ kutime en ju ajn tempo).

*

Mi deziras nun konsideri la interesan studon de Prof. Waringhien, en „Lingva Kritiko“ n-ro 9/10.

La grupigo de la verboj — en kiu ajn lingvo — laŭ klasoj, tial, kiajn imagis tiu estimata LK-ano, estas vera. Sed mi pensas, ke la ĝusta uzado de „estas“, „estis“, „ata“ kaj „ita“, krom la aliaj, dependas nur kaj simple de la cirkonstancoj, de la manko de mia penso, kaj ne de iu ajn klasifikado. Ĉiuj verboj povas ricevi ĉiujn formojn. Mi konsentas, ke, ekzemple, la verboj de klaso C, de Prof. Waringhien, t.e. tiuj de rezulto, „emas“ ricevi preferencan finaĵon **ita**; kaj tiuj de klaso A, la finaĵon **ata**. Sed mi ne komprenas, kial ĉi, por la klaso A, estas neklara. Ni trovas ĉi en la klaso A tute nature kaj sen konfuzo, ĉe Zamenhof mem.

Fundamento: „Mono havata estas pli grava ol havata“, t.e. „Momo, kiu estas (nun) havata, estas pli grava ol mono, kiu estas (jam) havata“. Mi pensas, ke nienu povus interpreti tiun ĉi frazon laŭ du manieroj.

„Marta“, pĝ. 56: „ . . . interkonfuziĝis . . . kiel labirinto de instruaj montroj kaj faktoj tute ne konataj, aŭ eble iam konitaj, sed jam de longe forgesitaj.“

Saml., pĝ. 106: „ . . . la nomo de la homo amita kaj perdita . . .“

Kabe diras: op. cit. pĝ. 9:

„ . . . la pli aĝaj filoj de l' faraono, naskitaj de la reĝidino de Ĥiti, . . . estis posedataj de malbona spirito . . .“

„Posedataj“ esprimas la daŭran staton tiaman; se Kabe dirus „poseditaj“, tiu stato estus jam ĉesinta en tiu tempo. Per tio ni vidas, ke la finaĵon **ita** oni povas uzi tre bone kun la „verboj de daŭro“.

La finaĵon **ata** en la klaso C ni ankaŭ trovas; bonvolu atenti: mi ne diras, ke Prof. Waringhien tute forstrekis tiun finaĵon el tiu klaso: sed li diris „malofte“. Ne temas tamen pri ofteco aŭ malofteco, — kio povus plikomplikigi la „problemon“ — sed nur pri la okazo fari uzon de tiu aŭ tiu finaĵo.

„Marta“, pĝ. 59: „ . . . sur la freŝa buŝo aperadis petola rideto, kvankam tiuj forigata, tamen sufiĉe montranta . . .“

Nu, „forigi“ estas verbo de „rezulto“: ago kaj rezultato preskaŭ koincidas, mi bone komprenis la penson de la eminenta LK-ano. En tiu frazo, kial „forigata“? ĉar temas tie pri ofteco de la ago: ni atentu al tiu „aperadis“; t.e., ĉiu aperinta rideto estis tuj forigita; sed tiu forigo daŭris: **ita + ita + . . . = ata**.

„Bat, de l' Vivo“, paĝ. 6: „ . . . la garboj . . . en la daŭro de multaj jaroj estis nomataj la garboj batalaj kaj metataj aparte . . . Tra longa tempo kun ĉiu farita sulko estis trovata postesigno de la batalo.“

Mi citis tiujn ĉi por prezenti verbojn de la klaso C: „meti“ kaj „trovi“ kun la finaĵo **ata**.

„O.V.“, pĝ. 34: „Tiuj ĉi vortoj estis kreataj unu post unu, laŭ la kreskanta bezono . . .“

Mi pensas do, ke ni ne povus normigi la uzadon de tiuj finaĵoj alie ol ili mem postulas laŭ sia signifo kaj laŭ la senco esprimota. Nur la senco, nur la frazo ordonas tiun aŭ tiun formon. Ekster tiu kriterio ni nepre trovos „ata“ nekonvena al tiu verbo, „ita“ netaŭga al tiu alia verbo, „estis ita“ nur apartenanta al la pluskvamperfekto, kaj ni tiel implikigas en tiu reto, ke ni kreas „problemon“ malfacile aŭ neniam solveblan.

D-ro Porto Carreiro Neto, LK,
Rio de Janeiro.

Bonvolu korekti!

En la lasta numero de „Lingva Kritiko“, p. 2, kcol. 3, lin. 14 legu „pozicio de prepozicio“ (anst. prepozicio de prepozicio“).

Ĉiun redakcian materialon sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italio; sed la materialo por „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.